9-a JARO, N-o 407 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. JULIO 1933

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO: E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO.
ADMINISTREJO: 23, rue Boyer, Paris 20e.

Raportaro de la Plenum-Komitato de SAT

(1932 - 1933)

B) Redakcio

Kun escepto de unu duobla n-ro (junio-julio) de « S.R. » la organoj aperis en regula amplekso, t.e. 8 paĝoj por « Sennaciulo » (inkluzive « La Lernanto) k 16 paĝoj por « Sennacieca Revuo », kiu lasta depost marto reviviĝis, por kompensi iaparte la malaperon de « La Nova Epoko » en februaro. Pri la neceso de tiu apermaniero de niaj organoj ni ne plu bezonas insisti ĉi-loke : por povi konservi sufiĉe grandan kvanton da abonantoj ankaŭ en la krizotempo, necesis ebligi al tiuj, kiuj ne povus pagi kotizon por ambaŭ organoj, esti aktivaj membroj ricevante nur unu, nome la oficialan organon « Sennaciulo » monate. Cetere, estu por la honoro de niaj membroj dirite, ke relative nur malgranda kvanto da Gek-doj uzis ĉi tiun mizertempan rajton. Estas ĝojiga fakto, ke la plimulto el la membroj pagis, se eĉ nur pene k per kvaronjaraj partopagoj ofte, tamen por ambaŭ organoj. Tiu fakto montras la oferemon k seriozon de tiuj membroj, kiuj ankaŭ en la nuna tempo restis fidelaj al sia Asocio k deziris la spiritan interligon, kiun alportas la SAT-gazetoj.

Dum aprilo k majo ni havis bedaŭrinde gravajn malfacilojn en la aperigo de la gazetoj, sekve de la malbona labormaniero de la nova presejo, kiun ni estis devigataj elekti post la regiĝo de Hitler en Germanio. Tamen la redaktoro ĉiam zorgis pri sufiĉe frua livero de la manuskriptaro k sekve havas nenian respondecon rilate al prokrastoj.

Laŭ la supre priskribita nov-aranĝo de la apermaniero la enhavo de « S-ulo » kiel oficiala organo devis konsisti preskaŭ ekskluzive el komunikoj, notoj k artikoloj pri SAT k la diversaj LEA-oj, kroniko, ktp., sed ne plu ofte povis enteni raportojn pri la laborista movado ĝenerala. Ĝi havis ununure la celon esti informilo por la membraro, precipe tiu parto, kiu ne povas nuntempe aboni al ambaŭ gazetoj. Pro tiu ŝanĝita aspekto de « S-ulo » ni ricevis kelkajn plendojn de K-doj, kiuj diras, ke la enhavo de la gazeto ne plu kontentigas ilin. Por solvi tiun problemon ni deziras koni la opinion de kiel eble plej multe da K-doj.

Ĉar « S-ulo » tute akceptis la rolon de oficiala komunikilo, la spaco de « Senn. Revuo » kompreneble estis libera por ĉio alia, nome *a*) je duono por raportoj el ĉiuj regionoj de la terglobo, tiaj, kiaj aperis en la antaŭaj jaroj en « S-ulo » k *b*) je duono por belliteraturo k sciencecaj artikoloj, recenzoj, ks. Per tio, ke aperis la laste citita materialo en « S.R. », la revuo estis anstataŭanto por la malaperinta « La N.E. ».

Ankaŭ rilate al la aranĝo de « S.R. » ni kompreneble bonakceptas konsilojn, kritikojn, sugestojn.

Por la 400-a n-ro k la maja « S.R. » ni faris specialajn alvokojn por kunlaboro ; tiel la nomitaj n-roj ricevis apartan aspekton, kiu taŭgigis ilin speciale por la varbado k disvendo en la grupoj. Multaj K-doj profitis tiun okazon, almenaŭ koncerne la 400-an n-ron, ĉar ni disvendis el ĉi tiu milon da ekzempleroj super la ordinara eldonkvanto. Rilate la majan n-ron ni ne sukcesis tiel bone, kvankam ankaŭ ĉi tie multaj el la samaj laboremaj K-doj (el kiuj ni ne volas nomciti iujn, por ne ofendeti aliajn) kunhelpis laŭ siaj fortoj. Kompreneble oni devas konsideri, ke tiu lasta n-ro ne plu estis grandkvante disvastigebla en Germanio.

Nelaŭdan kritikon pri la enhavo de niaj gazetoj ni ricevis de kelkaj legantoj el Strasburgo, kiuj trovas, ke ilia enhavo ne estas sufiĉe klasbataleca. Al tio ni rimarkigas, ke pri grado de klasbataleco estas malfacile juĝi laŭ la ekstera prezento de l'materialo k laŭ la sono de l'vortoj. Ankaŭ oni ne devus fingromontri al tiu aŭ alia artikolo (tiuj K-doj cetere citis neniun speciale), sed juĝi laŭ la tuto k ĝia efiko sur legantojn. La kritikanto mem cetere sendis nenian kunlaboraĵon, kiu estus rifuzita. Kvankam la spaco nun estas treege limigita (ni publikigas ja ne nur raportojn, sed ankaŭ belliteraturon ktp.), ni neniam malakceptas interese k sencoplene verkitan artikolon.

Tro drastajn polemikaĵojn kompreneble ni, fidelaj al niaj gvidprincipoj, devas malakcepti[1]. Okaze de la disrompiĝo de l'socialismaj organizoj en Germanio aperis tamen pluraj kritikaj artikoloj en « S-ulo » k « S. R.», sed tiuj kritikoj neniam degeneris en insultojn aŭ ofendojn al alitendencanoj. Kritiki en deca formo devas esti permesate, ĉar sen kritiko fruktodona pensinterŝanĝo ne eblas. Juĝi juste pri tio, kio estas klasbatala ago k kio ne, ofte ne estas facila afero, k la kunlaborantoj al SAT-organoj ĉiam kun skrupuloj pripensu tion, por ke la redaktora krajono ne bezonu forstreki facilanime faritajn eldirojn...

*
* *

« La Lernanto » aperis laŭ la sama maniero kiel en antaŭaj jaroj. Kelkaj K-doj bone komprenis ĝian celon k helpis per trafaj kunlaboraĵetoj. Tamen ni tre dezirus, ke pli multaj el la komencantoj decidiĝu ekverki iom por « L.L. ». Ili ja havos bonan kompenson en tio vidi presitaj siajn verkaĵojn. Kaj aliaj ĉerpos el tio kuraĝon k verketos siavice... Por ĉiuj rubrikoj mankas al ni kunlaborantoj, precipe por la infan-rubriko k ankaŭ por la « distra » angulo. La redaktoro mem devis fari ĉiujn enigmojn. Ĉu neniu volas helpi al li en tiu fako ?

[1] Escepte se temas pri defendo de nia organizo kontraŭ skismulaj atencoj !

Al la Membroj
de la Federacio de Lab. Esperantistoj en la nederlandlingva regiono

Karaj Gekamaradoj !

Estu kore salutataj vi ĉiuj, kiuj tenas hodiaŭ por la unua fojo en manoj ekzempleron de la oficiala organo de SAT : Sennaciulo. *Estas vere, ke kelkaj centoj el inter vi, aboninte laŭ propra iniciato nian gazeton jam tre bone konas ĝin. Por multaj inter ili ĝi fariĝis fidela amiko k samvojulo; dum longaj jaroj ili legis ĝin; k ĝi fariĝis por ili nepre necesa intelekta nutraĵo.*

Certe, en antaŭaj jaroj Sennaciulo *estis pli ampleksa, pli mult-enhava, ankaŭ pli multekosta ! Nu, pli ol iam en tiu ĉi malbona kriza tempo montriĝas kiel vero, ke por malmulte da pago oni ne povas multon liveri. (Kiuj inter vi volos legi pli multe da esperantaj artikoloj, raportoj k bel-literaturo, tiuj abonu al nia monata « Sennacieca Revuo », en kiu ili trovos abundan materialon.)*

La celo de Sennaciulo *estas ĉefe interligi vin kun la* tutmonda *laborista esperantistaro. Nia gazeto informos vin, kiel oni laboras ĉi tie k tie en la mondo por nia komuna afero. Vi baldaŭ spertos ĝojigan efikon de la legado: via vido mirinde plilarĝiĝos. La artefaritaj limoj ja ne ekzistas antaŭ la komuna esprimilo, kia estas la lingvo esperanto. Legante gazeton redaktitan tute en esperanta lingvo, sciante, ke tiu ĉi gazeto iras en ĉiujn regionojn de la terglobo, al Afriko, al Aŭstralio, al Japanio, al Ameriko, vi sentos iom, ke solidaro trans la landlimojn* helpe de esperanto *ne estas nura vana agitvorto. Ĝi alprenas konkretan formon: vi ligiĝos per nevideblaj fadenoj kun viaj fratoj-samsortanoj k samcelanoj en la tuta mondo. Tiele vi pli bone komprenos la signifon de esp-o k la rolon, kiun povas ludi SAT.*

Do, koran bonvenon en niaj vicoj ! Kaj varman gratulon al la gvidantoj de la Federacio de lab. esp-istoj en Nederlando, kiuj klopodis por atingi tiun imitindan *iniciaton. Ili bone komprenis, ke la por- k peresperanta agadoj devas iri paralele k sin apogante unu la alian. Ĉi tiu unua elpaŝo montras la vojon k espereble aliaj L.E.A. alprenos pli malpli frue saman decidon, kio ebligos, ke* Sennaciulo *fariĝos la plej multe legata gazeto en tuta Esperantio.*

Sur la ĝusta vojo antaŭen !

La Redakcio.

C) Administracio

Fine de junio 1933 la sumo da *pagantaj* abonantoj estis por « Sennaciulo » 1558[1] k por « Sennacieca Revuo » 1375. « La Lernanto » estis krome aparte abonata de 3.100 legantoj (el kiuj 2500 pere de la Sveda Lab. Esp. Asocio). La statistiko de l'membraro estas : 1471 aktivaj k 144 aspirantaj aŭ subtenantaj (do sume : 1615).

Ĉi-supraj nombroj povos aperi tre modestaj precipe al nekonantoj de nia movado. Oni devas konsideri tamen kompare la nombrojn por la esperanto-movado ĝenerale por havi ĝustan bildon pri niaj fortoj. La IPE-a gazeto « Isto » jam de kelkaj monatoj ne aperas k la IPE-a literatura revuo « La Nova Etapo » havas nur 233 abonantojn, laŭ statistiko publikigita en la n-ro 131 de « Bulteno » de SEU. Ĉi-lasta havis je la sama dato nur 894 abonantojn. La neŭtrala « Literatura Mondo » ne havas multe pli ol 600 abonantojn k « Heroldo » 2000. Vi do vidas, ke en komparo kun tiu stato de la tuta esp-a movado nia pozicio ne estas tiom malbona k ke restas tute solida bazo por ekiri al novaj « konkeroj ».

Pri la *librofako* (vendonombroj) ni ne povas doni ekzaktan statistikon pro tio, ke nur antaŭ malmultaj monatoj okazis la fortransporto de l'tuta provizo el Lajpcigo al diversaj lokoj *(vidu la antaŭan n-ron)*. Ĝenerale la librovendado ne estis tiel vigla kiel en antaŭaj jaroj, k tio estas la ĉefa kaŭzo, pro kio la ĉi-jara *bilanco* montras kapitalperdon, malebliganta la repagon de pruntitaj monsumoj al niaj kreditoroj.

Aliflanke ni kontente povas sciigi, ke ni nun havas preskaŭ la certon trovi financan bazon por la dua eldono de la PlenaVortaro. Detalojn ni publikigos poste.

Komentoj k konkludoj pri la raportoj estos farataj buŝe ĉe la Kongreso.

K-doj ! La kapitaligo de nia librostoko estas unu el la ĉefaj rimedoj por sanigi la financan bazon de SAT ! Mendu librojn k propagandu por ili ! Postulu nian katalogon ! Mendu ankaŭ esp. librojn el aliaj eldonejoj ĉe SAT (aldonante 10 % por la afranko) !

---

[1] Oni atentu, ke ekde ĉi tiu monato pro la interkonsento pri livero de « S-ulo » al ĉiuj membroj de la Nederlanda LEA la eldonkvanto de « S-ulo » atingos 4000 k tiu de « La Lernanto » (kun la apartaj abonantoj) 7000 ekzemplerojn.

Elektoj al la instancoj de SAT

1. *Plenum-Komitato.* — La SAT-Rondo de *Parizo*, konsiderante unuflanke la negativajn provojn starigi la novan P.K. en alia urbo, aliflanke la konsenton de kelkaj el la ĝisnunaj P.K.-anoj partopreni en nove konsistigota Komitato, decidis en sia kunsido de la 7. julio proponi la urbon Parizo kiel sidejon de la Asocio kun jenaj 6 kandidatoj : K-doj *Banmer, Baro, Bartelmes, Devaren, Pakje, Platjel.*

2. *Ĝenerala Konsilantaro.* — Ĝis nun estas prezentita nur la kandidateco de K-do *M. Ru* (Roux) en Ljono (Lyon) por la O-a horzono. Ni petas ankaŭ K-dojn el aliaj horzonoj, kie loĝas multnombraj SAT-anoj, prezenti kiel eble plej baldaŭ kandidatojn (1-a, 19-a k.a.). La nomoj de la L.E.A.-reprezentantoj por tiu institucio[1] ankaŭ estu komunikataj en konvena tempo, t.e. ĝis la ekfunkcio de la nova P.K.

3. *Konflikt-Komisiono.* — SAT-rondo, kiu sentas sin kapabla k havas emon konsistigi en sia urbo la K.K., bonvolu proponi (ĉu skribe, ĉu per persona reprezentanto) sian kandidatecon al la Kongreso.

[1] Vidi la statuton, paragr. 16, alineo Ĉ. — Ni memorigas, ke la teksto de la nova Statuto estas presita en la n-o 396 de « S-ulo ».

Niaj poŝtĉekaj kontoj :

Paris	**n-ro 1234**	**22**
Bruxelles	**n-ro 350**	**189**
S'Gravenhage	**n-ro 211**	**533**
Kopenhago	**n-ro 4**	**986**
Leipzig	**n-ro 85**	**148**
Stockholm	**n-ro 74**	**153**
Wien	**n-ro D-109**	**068**
Zagreb	**n-ro 41**	**448**
Zürich	**n-ro VIII-200**	**49**

Ĉiuj je la nomo de SAT, 23, *rue Boyer, Paris* 20

Se vi bezonas taŭgan materialon por trafe propagandi esperanton ; se vi volas havi klaran komprenon pri la signifo de la SAT-movado, nepre mendu, legu k primeditu ĉi tiun verkon :

Vortoj de K-do Lanti

190 paĝoj. Form. 13 × 19.

Prezo : fr. fr. 10.80.

Jen cetere pri tiu eldonaĵo la opinio de malnova SAT-ano, kiu devis forkuri el Hitlerio :

« La sola libro, kiun mi kunportis, forlasante mian familion, estas « Vortoj de K-do Lanti » Kiomfoje mi jam tralegis ĝin dum mia foresto de E..., tamen mi ĉiam denove trovas novajn valoraĵojn por instigo al pensado. Se tio jam estas ebla ĉe malnova SAT-ano, kiomfoje pli necesa estas tiu ĉi libro por la novaj pioniroj de nia ideo. »

XIII-a Kongreso de SAT en Stokholmo

(5-a — 10-a de aŭg. 1933).

Adreso : Upplandsgatan 1, Stockholm C (Svedio).



Sesa komuniko

AL LA BICIKLISTOJ : Pro specialaj leĝoj pri bicikloj oni ne rajtas veturi per tiaj en Stokholm sen havi numeron sur la veturiloj. OKK tial devis sin turni al la polica instanco kun peto, ke la biciklistoj el eksterstokholmaj lokoj rajtu veturi tra la urbo montrante specialan rekonilon, nome *ruĝan triangulan standardeton kun verda stelo*. Nian peton la policaj instancoj akceptis k ni mendis sufiĉan kvanton da standardetoj, kiuj jam en Malmő estos akireblaj ĉe la antaŭkongresa komitato. La standardeto mezuras 30 × 15,5 cm. k kostas 0,75 sv. kr. (Tiuj, kiuj mem volas fabriki samspecajn, nature povas fari, ĉar ili ankaŭ validos.)

AL LA TRAMISTOJ : Per instigo de niaj tramistaj K-doj en Stokholmo la tramista kompanio donos al ĉiuj aliurbaj tramistoj la favoron de senpaga vojaĝo per la aŭtubusoj k la tramoj de Stokholmo dum la kongresaj tagoj. Alportu tial pruvilon pri via tramisteco. Krome ili estas invitataj al la feria hejmo de la tramistoj ekster la urbo, kie la sindikato donos manĝon.

RADIA DISAŬDIGO DE LA SOLENA PROGRAMO : OKK faris peton ĉe la koncerna instanco de Radioservo pri disaŭdigo de la solena programo en la koncerta domo, dimanĉon la 6an de aŭg. je la 20-a h. Verŝajne parto de la programo ankaŭ estos disaŭdigata. Parolos interalie la ministro de klerigo Arthur Engberg k K-do Lanti.

Por sabato, la 5-a de aŭg., OKK aranĝis interkonatiĝan vesperon, dum kiu okazos salutparoloj, manĝo ktp. Ĉio estos senkosta por la kongresanoj tute. Ni admonas al ĉiuj kongresanoj veni ĝustatempe por povi partopreni tiun kunestadon. Ĝi okazos en la plej bela k fama restoracio de Stokholmo, Berns Salonger.

Sendu kiel eble plej frue vian aliĝilon.

Ni deziras al ĉiuj SAT-anoj k kongresanoj koran bonvenon en Stokholmo.

GRAVE : OKK. petis fervojan malkarigon por la eksterl. k svedaj kongresanoj. La plej multaj verŝajne pasos tra Malmö, partoprenante la antaŭkongreson vojaĝos poste kun la svedaj k-doj grupe al Stokh. Sed reire al la limo la fremduloj havos malkarigon de 25% je la fervoja biletprezo. Tiu malkarigo validos por ĉiuj fremduloj, kiuj vojaĝos dum la semajno de 5.- 12. aŭg. (eĉ unuope). — En la 5. komuniko (n-o 406) estas erare menciite, ke K-do Neergaard gvidos la gimnastikon ; tion li *ne* faros. Dependas la ĉeesto de K-do Moravec, ĉu la gimnastiko okazos aŭ ne.

OKK.

4-a listo de aliĝintoj

104 T. Artigas, Zaragoza, Hispanio,
105 K-dino Svea Jönsson, Malmö, Svedio.
106 K-dino Margit Norling, Malmö, Svedio.
107 K-dino Gunborg Persson, Malmő, Svedio.
108 Olof Olsson, Vännäs, Svedio.
109 K-dino Anna Gyllsdorf, Linköping, Svedio.
110 John Karlsson, Västerhaninge, Svedio.
111 K-dino Dorothea Scott, Letchworth, Anglio.
112 Hans Bruckenberger, Letchworth, Anglio.
113 Anna Bergstedt, Strömstad, Svedio.
114 Nils Martensson, Stockholm, Svedio.
115 Evert Martensson, Stockholm, Svedio.
116 Josef Ström, Stockholm, Svedio.
117 Dagny Rosèn, Stockholm, Svedio.
118 Henning Kumlin, Stockholm, Svedio.
119 K.E. Eriksson, Stockholm, Svedio.
120 Siegfr. Kump, Leoben, Aŭstrio.
121 Wolfg. Prieger, Leoben, Aŭstrio.
122 Jos. Fischer, Leoben, Aŭstrio.
123 Joh. Strubel, Bruck-a.-M., Aŭstrio.
124 Axel Fall, Gustavsberg, Svedio.
125 Axel Björkman, Gustavsberg, Svedio.
126 K-dino S. Berggren, Malmö, Svedio.
127 K-dino Mina Rosell, Stockholm, Svedio.
128 K-dino Sigr. Johansson, Stockholm, Svedio.
129 K-do H. Nielsen, Odense, Danio.
130 K-do J. Martinez, Solliès-Pont, Francio.
131 K-do Anders Persson, Stockholm, Svedio.
132 K-do Torsten Persson, Stockholm, Svedio.
133 K-do Arvid Persson, Stockholm, Svedio.
134 K-dino Anna Eriksson, Stockholm, Svedio.
135 K-do Ivar Eriksson, Stockholm, Svedio.
136 K-do Sven Eriksson, Stockholm, Svedio.
137 K-do Joel Sulsky, Harpenden, Anglio.
138 K-do B. J. Jonsson, Mora-Noret, Svedio.
139 K-do Edvin Rosén, Slöinge, Svedio.
140 K-do A. E. Alm, Bengtsfors, Svedio.
141 K-do Henry Blom, Nynäshamn, Svedio.
142 K-do Ragnar Eriksson, Stockholm, Svedio.
143 K-dino Astrid Fredriksson, Stockholm, Sv.
144 K-dino Agda Carlsson, Stockholm, Svedio.
145 K-dino Greta Őstlund, Stockholm, Svedio.
146 K-dino Alfhild Lind, Stockholm, Svedio.
147 K-do Gunnar Lind, Stockholm, Svedio.
148 K-do Bengt Nordström, Stockholm, Svedio.
149 K-do G. A. Söderkvist, Stockholm, Svedio.
150 K-do V. Appelkvist Rasunda, Svedio.
151 K-do A. E. Lundström, Stockholm, Svedio.
152 K-dino Jessie Campbell, Dunfermlino, Britio
153 K-do Will. Campbell, Dunfermlino, Britio.
154 K-do Esk. Johansson, Eskilstuna, Svedio.
155 K-dino Märta Mahl, Eskilstuna, Svedio.
156 K-do Petrus Plank, Dordrecht, Nederl.
157 K-do Verschoof, Hœk van Holland, Nederl.
158 K-dino E. Limouzin, Paris, Francio.
159 K-do Adolf Tandlund, Umea, Svedio.
160 K-do H. Svensson, Hässelby vst., Svedio.
161 K-do Gerh. Johansson, Värtan, Svedio.
162 K-do Arne Jonsson, Stockholm, Svedio.
163 K-dino Elna Larsson, Rasunda, Svedio.
164 K-do Hilmer Larsson, Rasunda, Svedio.
165 K-do Vollert Bohman, Södertälje, Svedio.
166 K-do Henning Larsson, Södertälje, Svedio.
167 K-do Karl Axelsson, Södertälje, Svedio.
168 K-do Gust. Nilsson, Västeras, Svedio.
169 K-do G. Novion, Paris, Francio.
170-206. K-dinoj Jansson (Estonio), Kvist, Sandström, Solander, Broström, M. Johansson, Viberg, Pettersson, R. Eriksson, S. Svensson, K-doj Malmkvist, Bergström, Jörgensen, Tage Erikson, A. Nilsson, A. Gustafsson, Olausson, Planman, Svanström, Berglund, Fransson, H. Johansson, G. Karlsson, J. Svensson, Rönnbäck, Gr. Andersson, Th. Andersson, Colding, D. Eriksson (Svedio), Puff, Maack, Gek-doj Koth (Germanio), Stoiber (Aŭstrio), Roberts, K-dino Dean (Anglio) k Sennomulo.

Ipe - Skisme - Ise

Kiam skisma malsano atakas iun movadon, oni neniam scias, ĝis kia grado ĝi efikos. Post la fondiĝo de I.P.E. (ne demandu pri ĝia sano ; ne demandu, ĉu ĝi kongresos nunjare en Moskvo, kiel estis blufe dirite ĉe la fondkongreso, ne demandu... tio estus ja maldiskreta), jen naskiĝis I.S.E. Inter la akuŝantoj troviĝas neŭtralulo kiel la franca deputito Couleaux, neesperantistoj, kiel Demeny (Budapest), Paul (Aussig), « nederlandano » el Aŭstrio, kiel Klatil k.a. malpli eminentaj personoj. Kaj sendube por pravigi la skismon, « La Socialisto » grandanime montras karikature la difektitan SAT-ŝipon k sprite (ho, kiom !) versas :

" Brečojn ŝtopu kiu emos !
" Mi kun firma ISE remos. "

Plie la « SAT-bonzoj » estas avertitaj : ne ataku nian ŝipon, aliel vi aŭdos niajn kanonojn. Ni ja deziras pacon, sed...

Estas vere, ke la « SAT-bonzoj » estis vere stultaj. Anstataŭ simple lasi perei la ŝipon, difektitan per la perfida atako de la pli fruaj skismigantoj, ili pruntis sian propran monon por ripari la ŝipon. En nia bela epoko, tia naivaĵo povas nur veki mokon ĉe la redaktoroj de « La Socialisto ». Sed, amuza konstato, apenaŭ la gvidantoj de I.S.E. staras ĉe la direktilo de la tute nova, sendifekta ŝipo, jen ili tuj almozpetas : « Ni ne volas jam komenci per « brečoŝtopado », sed ankoraŭ nia

Ĉe SAT aperis :

GVIDILO TRA LA ESPERANTA MOVADO

de G. P. de BRUIN

50 paĝoj. Prezo : 4 fr. fr.

stato estas malfacila k tial ni akceptas ĉian subtenon... »

Ni lasu al la legantoj la zorgon mem komenti la aferon... Dume laŭ raporto de la aŭstra K-do Geh., kiu ĉeestis k disdonadis la prospekton, kiun ĉiuj SAT-anoj sendube konas k ankaŭ multobligitan « Malferman leteron », kies tekston oni legu ĉi-apude, ni konigu kelkajn detalojn pri la soleno de la fondkongreso de la nova internacio.

Alveninte en Vieno (sabate, la 3.6.), mi iris al la sindikata domo, kie okazis la salut- k « fest »-vespero. Ĝi estis sufiĉe enuiga k teda. Enuigaj paroladoj de K-doj Jonas, Weinhengst k Simon, en kiuj ili laŭdis k prikantis la «ruĝan komunumon» Vieno. La sola, kiu plaĉis, estis parolĥoro de hungaraj Gek-doj.

Mi estis jam komencinta disdonadi niajn SAT-prospektojn (proks. 25-30), kiam iu venis al mi k demandis pri mia agado. Responde mi donis al li ekzempleron. « Ĉesigu vian agadon ! » li kriis. Per lia kriado aliaj K-doj estis atentigitaj k venis, petante de mi tiajn « malpermesataĵojn ». Do kaŝe mi daŭrigis la disdonadon. Intertempe mi sciiĝis, ke tiu K-do estis Jonas. Duafoje mi estis kaptata. Nun mi jam konis la « K-don ». Li kriis kolere : « Ĉu tio estas proleta disciplino ? Fiporkaĵo tio estas. Ankoraŭfoje mi diras al vi : ĉesu ! » (Germanlingve li parolis.) Ĉar tie la disdonado ne plu eblis, mi ĝin daŭrigis sur la strato.

Dume multaj K-doj kolektiĝis ĉirkaŭ ni. Unu juna Vienano volis helpi al mi. Sed ili (Jonas k cet.) nomis lin « fiknabo » k minacis eksigi lin el ALLE. Poste tiu juna K-do helpis al mi disdoni la prospektojn ĉe la elirejo. Dum la elirado (post la kunveno) ni disdonadis diligente. Subite oni *perforte* forrabis el miaj manoj 15-20 katalogojn.

Dum la festvespero ĉeestis sume 300 personoj (mi nombris ilin). Kie do troviĝis la blufe anoncitaj 800 hung. K-doj ? Enigmo. Dimanĉe okazis plenkunveno de ALLE en laborista hejmo en Floridsdorf. Ĉeestis 120 (cent dudek) Gek-doj. Kaŝe mi disdonis la « Malferma Letero » n, nur 100 ekz-ojn ; ĉar ja ne estis pli multaj personoj. Jen io tre karakteriza : Iun el Ĉeĥoslovakio, K-don Paŭl el Aŭssig, oni vokis al la tribuno. Li ekparolis : « Karaj K-doj. Mi salutas vin... mi ne povas... mi parolos nacilingve... » Ho ve, ho ve ! Preskaŭ mi volis plori. Certe, tiuj homoj bezonas nepre internacion.

Kiel efikas sur sampartianojn la ISE-a skismo

El Nederlando.

En « La Socialisto » n-o 6 aperis enkonduka artikolo al fondo de Internacio por Socialistaj esperantistoj. Plue estas menciita komuniko pri la Iniciata Komitato de ISE. Ĝi surhavas la nomojn de la komitatanoj k ĉe la fino de tiu komuniko bildeton, kiu montras 2 ŝipetojn. Unu kun nomo « SAT » estas pene riparata, dum alia kun nomo « ISE » estas remmovata. La tuto trafe esprimas ĝojon de la ISE-anoj pri la malhelpo al la SAT-anoj. Ni tamen lasu la ĝojon al ili k plenkonscie konstatu el tio, ke nova ŝipeto povas iri sur malnova k konata lageto limigita ĉiuflanke k ke malnova k eble kaduka ŝipeto povas iri novan direkton, por trovi novan por la proletaro fruktedonan mondon senliman.

Estas kompreneble, ke en ĉiuj epokoj iel regas ia anakronismo inklina al antaŭenmarŝo. Sen ĝi la vivo estus malviva. Kaj eĉ socialismo estas esprimo de tiu inklino. Ĉu ni pro tio devus ĝoji, ke la socialismo havus kadukan ŝipeton kredigante al ni, ke la lageto povos konduki nin al nia idealo ? Ĉu ni pro tio devus iri nepre laŭ la vojo jam konata k limigita k forĵeti la anakronismon de la socialismo ?

La nomita enkonduka artikolo penas pruvi, ke la strukturo de SAT ne taŭgas ke la nefruktedona rilato kun la landaj asocioj estus nekontraŭdirebla fakto. Ĝi aldonas pri klopodoj, kiuj ne sukcesis k per tio montras, ke la granda plimulto el la SAT-anoj ne konsentis starigi internacion, tiel forĵetante la eblojn de esp-o favorajn al utiligo por tutmonda proletaro. Ebloj, kiuj ankoraŭ estas en embriaj formoj, sed kiuj jam portas la nunan anakronismon, kiu iam klare k konkrete sin montros kiel realaĵon.

La starigo de esperantista *internacio* nur povas konduki al ĝia likvido ĉe oficialigo de esp-o, dum mondorganizo konsistanta el unuopaj membroj suriras vojon al plej perfekta organizformo, al kiu kultura k kleriga organizo, kia estas SAT, povas konfirmiĝi.

Oficialigo de esp. ja signifas likvidon de la landaj organizoj, ĉar ili ne plu havas ekzistorajton, la internacio sekve malaperos, dum la organizo, kiu konscie edukas sur proleta kampo al tutmonda bazo tiam plene povas funkcii. Internacio esperantista povas servi al niaj partiaj movadoj, same kiel povas servi al ĝi la landaj organizoj, ne pli. Cetere se estus iom da bonintenco, ili kiel instanco de SAT mem. plene povus fari la saman taskon, kiun ili nun intencas plenumi.

Per la enkonduka artikolo « La Socialisto » tuŝas ĉion rilate al SAT, sed ne ĝian kernon : « La Sennaciecon ». Ne tuŝante tiun flankon, ĝi ne povas esti konsiderata kiel fundamenta artikolo kontraŭ la starpunkto de SAT, k sekve ni devas konkludi, ke aliaj « kialoj » influas k ne nur « idealaj ». Por mondlingvanoj la sennacieca bazo de SAT estas la sole konsekvenca k celkonforma. En Nederlando, kie SAT bone enradikiĝas, la nova « Internacio » (konklude al la pasinta kongreso de la nederlanda LEA) certe estas konsiderata kiel kontraŭa al SAT kiu lasta plene k ĉiurilate povas servi al la laborista movado. La landaj organizoj en la kadro de SAT povas atingi ĉion, kion celas atingi ISE. La starigo de ISE signifas malkoncentrigon de la fortoj k sekve malfavoron al la tutmonda laborista movado kompare al tio, kio estus atingebla.

La estraro de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo lojale k firme subtenas SAT, laŭ la Gotenburga konvencio.

A. Veen,
Sekr. Nederlanda LEA.

Amsterdam, 13.VI.33.

El Svedio.

La homoj ne estas egalaj, ili estas malegalaj, ekzistas belaj, malbelaj, saĝaj, prudentaj, malprudentaj ktp homoj. Tiujn vortojn uzis pastro Ĉe en siaj lecionoj. Kiam mi legis la sciigon, ke la aŭstroj fondis novan mondorganizon esperantan, mi rememoris la vortojn, kiujn Ĉe diris : ekzistas... prudentaj malprudentaj homoj. Jes tiel vere estas.

El Aŭstrio ni lasttempe aŭdis strangajn voĉojn pri organizado de esperantistoj laboristaj. Sed oni ne tuj volis kredi, ke ili vere celis fondi ankoraŭ unu mondorganizon. Nun tamen estas fakto k ke socialistoj, kiuj nomas sin demokrataj tion faris, estas mirige. La socialistojn en Aŭstrio mi ĉiam rigardis kiel prudentajn samopinianojn, sed la sciigo, ke la esperantistoj tie agis tiel malprudente, aliformis mian opinion pri ili. Ĉu vere la aŭstriaj Gek-doj estas tiel netoleremaj, ke ili ne povas aŭ volas labori kune kun la ceteraj en SAT, post kiam la bolŝevikaj rompintoj estas for ? Ĉu vere estas demokrataj socialistoj ? Se estas, ili ne plu meritas la nomon demokratoj. Sed eble estas nur unuopaj regemaj personoj, kiuj sukcesis kolekti ĉirkaŭ si kelkajn, k ke ne ĉiuj aŭstriaj Gek-doj estas tiel malprudentaj, sed restas en SAT.

Mi esperas, ke la Gek-doj ĉie en la mondo komprenas, ke pluraj mondorganizoj esperantaj estas kruelaĵo. Ni jam solvis la organizadon por la laboristaj esperantistoj en plej bona maniero per SAT. Se oni nur volas, la vivo en Esperantio povas esti senpolitika. Anstataŭ enkonduki, ni evi-

tu lande k monde organizadon partie tendencan. La socialista frakcio inter SAT-anoj sufiĉas, k ĝi ankaŭ estas malfermita por la aŭstriaj Gek-doj. La frakcioj inter la SAT-anoj celas nur propagandi por esp-o inter la diversaj politikkunuloj. Sufiĉas.

Do la socialista mondorganizo restu interne de la aŭstria limo.

Jalĉjo, Stokholmo.

Malferma letero al la partoprenantoj de la « Mezeŭropa Konferenco »

Vieno.

Karaj Gekamaradoj !

Vi nun estas kunvenintaj kun la celo « finkonstrui la bazon por plua evoluo de la socialista esperanto-movado », kiel ni legis en la maja n-ro de « La Socialisto ». Ci-okaze vi eble permesos ke ni diru nian opinion pri tia via klopodo.

Ni volas kredi, ke nur la intereso por socialismo k por esperanto instigas vin. Se tiel estas, tre mirigas nin la konstato, ke vi tute ignoras organizon, kiun aliĝas multaj socialistoj k kiu havas la subtenon de potencaj socialistaj organizoj. Ni aludas pri SAT, kies Va Kongreso okazis ankaŭ en Vieno dum la jaro 1925 k kiu nunjare okazigos sian XIII-an en Stokholmo. La fakto, ke tiu organizo jam ekzistas dektri jarojn k sukcesis elteni dum krizoj k eĉ kontraŭ bone preparita malhonesta atenco, devas esti sufiĉe pripensiga por saĝaj homoj, kies unua devo estas ne malatenti realaĵojn. Tial ni afable petas vin : ne faru facilanime decidojn, kiuj neniel povus helpi al la sukceso de esperanto en socialistaj rondoj.

Via skismiga plano estus ĝusta nur, se vi havus la *certon*, ke la IIa Internacio en ne tre malproksima tempo arigos la grandegan plimulton de la klaskonsciaj laboristoj k ke ĝi plie subtenos esperanton. Sufiĉas jeti ekrigardon super la ĝenerala stato de la laborista movado por akiri tuj la konvinkon, ke tia arigo ne estas baldaŭa, konsentante momente, ke ĝi estos iam ebla ; rilate al la dua punkto, estus trompi sin mem, se oni volus esperi, ke iu ajn el la nun ekzistantaj Internacioj baldaŭ alprenos nian lingvon, disvastigos k grandskale aplikos ĝin.

El tio sekvas, ke la laboristaj esperantistoj havas intereson esti ĉiuj grupiĝintaj en unu sama organizo tia, kia estas S.A.T. Ĝia starpunkto estas la sola, kiu ebligas al ĉiuj tendencoj, akceptantaj la klasbatalon, ke ili kunlaboru en frateca atmosfero k kun ebla maksimumo da harmonio. En ĝia kadro povas esti starigotaj ĉiaj necesaj fakoj, kiuj montriĝus necesaj por atingi la sukceson de esperanto en laboristaj rondoj. Neniam ni malhelpis interesajn iniciatojn ; male, ĉiam ili trovis niaflanke laŭpovan subtenon.

Ni scias, ke gvidantoj de A.L.L.E. eldiris la opinion, ke la strukturo de S.A.T. ne estas taŭga k ke ĝi devas esti aliigota. Tiucelaj proponoj estis faritaj lastan jaron k la proponintoj povis tute senĝene prezenti k defendi ilin en Stutgarto okaze de la XII-a Kongreso. La proponoj estis malakceptataj per grandega plimulto. Nu, ĉu do ne estas esenca organiza principo, ke la malplimulto devas submetiĝi antaŭ la plimulto ? Malakcepto al propono nenial povas pravigi eksiĝon de la proponintoj k ankoraŭ malpli ilian skismigan klopodadon. Tiele tamen agis gvidantoj de A.L.L.E. Kvankam tiu organizo estis ligita al SAT per la Gotenburga Konvencio, ili rompis la ligilon k pli k pli faris el « La Socialisto » konkurencan organon de « Sennaciulo ». Se oni komparas tian sintenon al tiu de la Nederlanda L.E.A., ekzemple, kiu decidis ĉe sia lasta Kongreso liveri ĉi tiun lastan organon al ĉiuj siaj anoj, estas facile tuj ekvidi, kiu el ambaŭ organizoj plej bone servas la interesojn de la tutmonda lab. esp. movado. Ĉiu ja facile komprenas, ke ju pli granda estas la eldonkvanto de presaĵo, des malpli ĝi kostas aŭ despli ĝi povas esti ampleksa k tiel despli ĝi akiras propran valoron k sekve pli grandan propagandan efikon.

Ni povus liveri amason da argumentoj, kiuj bone pravigas la vidpunkton de SAT, sed komprenebIe tion fari en simpla letero ni ne povas. Cetere ni celas nur altiri la atenton de ĉiuj sinceraj Gek-doj al la priparolita temo kun la espero, ke ili mem pripensos k fine obeos al la prudento, rifuzonte pligrandigi la skismon en la lab. movado. Ĉiuj niaj penoj male devas celi la rekuniĝon de la disigitaj fortoj, anstataŭ pereige plilarĝigi la fendojn.

Almenaŭ ni faris nian devon per ĉi tiu atentigo k sekve povas rigardi al la estonto kun pura konscienco k kun la firma konvinko, ke SAT estas nedetruebla k ke pli malpli frue ĝi reatingos sian antaŭan prosperon.

Por la Direkcio de SAT,
E. LANTI.

La praktika k detala lernilo
rektmetoda de l'lab. esperantistoj :
PETRO
104 paĝoj. — Prezo : 6 fr. fr.
SAT, 23, rue Boyer, Paris 20.

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

Sur erara vojo

Sub tiu titolo dupaĝa fruntartikolo en « Lab. Esperantisto » (Amsterdam), n-o 12, komentas la starigon de ISE (Internacio de Soc. Esperantistoj) en Vieno.

El tiu klara respondo al subfosantoj k skismigantoj ni citu almenaŭ kelkajn esencajn partojn : « ... La nederlanda LEA obstine k forte kontraŭstaris la skismigan IPE-anaron, kiu ne sukcesis enpenetri nian movadon ĉi tie, ĝi ankaŭ ĉiurimede malhelpos la ISE-anaron fari en nia organizo la similan malbenitan laboron... Ni deziras, ke la nederlandlingva LEA restu supertendenca... Neniun el la motivoj por internacia kunligo de la naciaj organizoj la nederlandlingva LEA akceptas kiel ĝustan. Eĉ opinias ilin danĝeraj k certe ne dezirindaj... Historie malĝuste estas, ke la naciaj asocioj estus la fontoj de la intern. lab. esp. movado. Estas la kuniga ideo de la esperantismo, kiu zorgis pri la pluvivado de la komuna lingvo. Kaj se ne estus necesaj — aŭ almenaŭ al la propagando pli favoraj — la landaj por-esp-aj organizoj, ni tutkore krius, for la naciaj organizoj !... FLE do kontraŭstaros ankaŭ al la ISE same kiel al la IPE. Ĝi klopodos, pli ol iam, ĉe la alilandaj LEA-oj atingi, pere de SAT, la pli intiman kunlaboron, kiu fakte jam estas ebla pro la decido elekti en la ĝeneralan konsilantaron reprezentantojn de la LEA-oj... ».

Ĉu la Lumo venas el Oriento ?

Ne, sed lavango da mistiko. 50-paĝa estas la duobla n-ro (feb.-marto) de « Oomoto Internacia », aperanta en la « sanktejo » Kameoka (Japanio). La ĉefo de tiu religia movado estas iu Onisabro Deguĉi, adoptita filo de la fondintino, kiu « ĉieliris » (t.e. mortis). La anoj de tiu sekto, kies oficiala lingvo estas esperanto, kredas, ke la ĉielregno baldaŭ venos sur la teron. En fruntartikolo s-ro Niŝimura provas senkulpigi la naciisman tendencon de iuj Oomotoanoj infektitaj de la japana propagando. « La blanka raso, kiu perforte okupis 8/10 de la tuta terglobo, certe ne havas moralan rajton fulmotondri kontraŭ Japanujo, kiu nur klopodas polici parton de Ĉinujo... sen iu ajn teritoria ambicio... ».

La revuo batalas ankaŭ kontraŭ la neologisma febro de iuj okcidentaj esp-istoj k protestas kontraŭ enkonduko de nenecesaj novaj vortoj. Tamen en la sama kajero ni trovas « uzino » (anst. fabriko, laborejo) k « konstrukcii », kie *konstrui* estas sufiĉe klara ; « teknokracio » anst. *teknokratio* (kp. demokratio, aristokratio, ktp.).

Kiu estas honesta homo en Hitlerio ?...

« Heroldo » disdonas en preskaŭ ĉiu n-ro trankviligajn pilolojn al tiuj, kiuj volus kongresi, sed... ne en Hitlerio. Tiel en la n-ro 24 (729) diklitere : « ... La vivo en Germ. por ĉiu honesta homo ne estas endanĝerigita ; ĉiutage eksterlandanoj konvinkiĝas per propra sperto, ke en Germ. regas ordo k trankvilo... » La ĝenerala difino pri « honesto » suferis strangan modifiĝon en la cerbo de tiuj, kiuj skribas tiajn liniojn. Honestaj la diktatoroj k tiranoj, kiuj subpremas per persekutoj, enkarcerigoj k murdoj la « malhonestulojn », kiuj kuraĝas esprimi alian opinion, havi alian imagon pri homa digno k libero !

« Pro eraro ne praviĝas la faro ».

Estas bedaŭrinde, ke la redaktoro de « Kataluna Esperantisto » ne finlernis esp-on k ne konas la diferencon inter la sufiksoj *ec* k *ism*. Aŭ ĉu la kataluna naciisto jezuite ŝajnigas nescion por kredigi al siaj legantoj, ke por aliĝi al SAT oni devas aprobi la sennaciismon ? Ni do denove akcentu, ke nia asocio estas sennacieca laŭ sia strukturo — sektorsistemo — sed neniel sennaciisma, ĉar nenie en la Statuto estas parolite pri tiu ismo. SAT ja estas malferma al ĉiuj tendencoj el la klasbatala laborista movado, k la sennaciismo estas nur unu el tiuj tendencoj.

El niaj Leteroj

El Germanio per diversaj vojoj alvenis al ni tre varme gratulaj leteroj pri la lastaj n-roj de « S.R. » k « S-ulo », en kiuj aŭdiĝis voĉoj de turmentatoj en Hitlerio. El ili ni publikigas parton de unu, kiu bone resumas la aliajn.

... En la nuna tempo ni kun tiom pli grandaj konfido k konvinko pro-

mesas nian plenan fidelon al nia movado, sciante k spertinte, ke SAT k ties gvidantoj sole pledis por la ĝusta efektiviginda taktiko, per kiu ni povos atingi la venkon de nia idearo. Nun ni « ĝuas » severan lecionon, sed ni parte meritis ĝin. Senskrupulaj gvidistoj nur tre bone komprenis ignorigi la veran celtrafan vojon. Kie nun restas la helpo de la ĉefa centro ? En ĝi oni nun interkonsiliĝas, konkludante, ke la taktiko estis ĝusta. Diri tiajn mensogajn vortojn signifas vangofrapi la realon. Ŝajne oni tute forgesis pri la restintoj, kiuj ja nun korpe k anime sentas la ĝuston de la taktiko. Tiu esprimo kronas la agon. Dume ni sub la plej malhumanaj kondiĉoj vegetadas, multaj K-doj, kiel la angla K-dino, kies artikolo aperis en « S.R.» polemikas pri la bravo de l'ĉi tieaj proletoj. Tio estas malŝparo je tempo, forto k mono. Devas sekvi agoj. Per belaj paroloj oni al neniu povas helpi. La plej utila k plej efika agado, per kiu oni povas pruvi la solidaron al ni, k samtempe en la propra intereso, estas : varbadi k senlace labori por la plifortigo de SAT. SAT kaptas la malbonon ĉe la radikaro mem. Temas ja ne nur pri unu lando, sed pri la tuta mondo k ĝia laborularo. Se vi ion uzos por « S-ulo », bonv. nur indiki la matrikulon. Promesante resti fidela amiko, mi sendas samideanajn salutojn. 16 816.

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 5 fr. fr., ĉiu plia linio 3 fr. fr. — Grandaj anoncoj kun kadro po kv. cm. kostas 1.20 fr.

Germanio.

K-do 16 900 petas ĉiujn siajn gekorespondantojn ne sendi al li ion ajn. Ankaŭ post sia reliberigo li estas sub konstanta kontrolo.

Artisto (29 j.) dez. kor. kun artistinoj aŭ artemulinoj kĉl pri ĉiuj problemoj rilataj al arto. *Hans Siedenschnur*, Zochstr. 13, *Rostock* (Meckl.).

Hispanio.

24-j. fraŭlo, teknik-teksisto, dez. kor. kun Gek-doj el ĉl. K-do *A. Santanyes*, Ponent 59, *Terrassa* (Barcelona).

21-j. fraŭlo, meblisto, dez. kor. kun Gek-doj el ĉl., pref. muzikistoj. K-do *J. C. Gasto*, P. 22 Juliol 418, *Terrassa* (Barcelona).

Gaspar Vilar, Grupo Laborista Esperantista, Horno Hospital 12, *Valencia*, dez. kor. kĉl, PK, por 30 lastkursaj gelernantoj.

Nederlando.

Lab. Esp. Societo) 'Antaŭen ' (adr. *G. Vugteveen*, Penninkstr. 14, *Enschede*) petas alsendon de L, PI k Esp-aĵoj por ekspozicio k koresp-ado. Nepre respondos.

K-do *W. Wessels*, sekr. de l'anark. frakcio, transloĝiĝis al : J. P. Heyestraat 87 hs., *Amsterdam (W)*.

Portugalio.

Juna komerclaboristo dez. kor. kun eksterl. Gek-doj, speciale junaj K-dinoj el Hispanio, Rusio, Danio k Aŭstrio. Adr. *Fernando Carveira Ribeiro*, R. da Escola Politecnica 111, *Lisboa*.

Sovetio.

Amikoj el tutmondo ! Por nia esp. ekspozicio bonv. sendi multnombre PK kun bildoj pri esp-o, glumarkojn, afiŝojn, Zamenhof-portretojn, div. esp. insignojn ktp al *Petro Surjanenko*, *Valki*, Harkovska oblast, Ukrainio.

K-do *Ŝadrin*, Vencika 49, *Samara*, 20-j. laboristo-studento, kor., interŝ. gaz.

K-do *L. Jarusov*, Radiostancia, *Kaŝirinsk*, SVK, pri liter. k.a. temoj.

K-do *S. Bojev*, 75, *Puŝkinskaja*, Vet-Bak-Institut, *Alma-Ata*, Kazakstan, sendas sov. eldonaĵojn kontraŭ germ.-lingvaj veterinaraj verkoj.

K-dino *T. K. Kulakova*, Jadrinskaja 4, *Omsk*, kĉl, prefere Ameriko, Japanio, Francio, Hispanio, Italio.

K-do *A. Sidorov* el *Voronej* troviĝas kiel politika malliberulo jam plurmonate en malliberejo k ne povas resp. al siaj gekor-antoj. Li sendas saluton k bondeziron !

Svedio.

Mi dez. korep. kun esp-istoj alilandaj per L k PK. Respondo garantiata. Adr. : Jurnalisto Almar Lofgren, *Anaset*.

2 K-doj dez. korep. k interŝ. PI kĉl. Resp. garantiata. Adr. : *Paul Tornkvist*, Sanatoriet, *Halahult*, Orebro.

La Esp. Grupo « La Fabriklaboristo » (25 Gek-doj) dez. kor. kĉl, individue aŭ kolektive. Skribu al : K-do *J. Assen*, Doovennetelstr. 8, *Amsterdam*.

Ĉiujn Gek-dojn ĉiulandajn ni petas alsendi materialon por ekspozicio ! Hilversuma sekcio FLE. Adr. : Gerri Bootsma, « Zonnestraal, *Hilversum*.

En nia movado

Ĉinio. La Ĉinia LEA (ŜEL, Ŝanĥajo), fondita en jan. 1933, kreskas sufiĉe rapide. Aliĝis dum 3 monatoj 278 membroj. La korespond-kurson partoprenas 175 p. Nuntempe la asocio gvidas 17 kursojn kun ĉ. 400 lernantoj. Abonantoj al ĝia organo « La Mondo » nombras 301. La librejo disvendis por 600 dolaroj da libroj dum 4 monatoj. (Laŭ « Mondo », n-o 5).

Polio. En *Lodz* fondiĝis antaŭ 2 jaroj esp. sekcio ĉe la socialista junular-organizo « Estonto ». Okazis dum tiu tempo du kuroj kun 40 lern. La sekcio kunvenas ĉiusemajne por perfektiĝi (25 K-doj). La estraro rekomendas aliĝon al SAT ; bedaŭrinde la granda senlaboreco estas tre malhelpa. (Laŭ hektografita bulteneto aperigata de la nomita sekcio : « La Socialista esperantisto ».)

Al la getipografistoj tutmondaj !

En la intereso de la klasbatalo k de esp-o estas tre rekomendinde, ke ni tipografistoj organizu nin internacie en la esp-a movado. Kvankam ni jam havas fortan internacian interligon, malhelpas la lingvaj baroj. Tial ni rekomendas fondon de internacia esp. tipografista unuiĝo, kiu povus esti protektata de SAT. Tipografistoj ĉeestontaj en Stokholmo, pritraktu tiun aferon k estu certaj pri la eĥo de l'tutmonda esp. tipografistaro !

Aladaro Breŭer, Dunajska 55, *Bratislava (Ĉeĥosl.)*.

La kolegoj, kiuj ĉeestos la SAT-Kongreson, sendu al ni informojn k konsilojn por starigi okaze de la Kongreso tutmondan tipografistan sekcion.

Stockholms Typogr. Förenings Esperantosektion, Fack 789, *Stockholm I. Svedio.*

« Ĉu la germana registaro konsentas publikigi kompletan liston de ĉiuj malliberigitaj personoj kun sciigo de la unuopaj kaŭzoj *sen escepto* k ebligi publikan kontrolon al ĉiuj homoj, kiuj interesiĝas pri la savado k ŝirmado de paco k kulturo de l'mondo ? »

Tian interpel-demandon faras *Fr. Isko*, nuntempe : *Gdynia I*, poŝt-restante (Polio). Ĉu naivaĵo ? Pri tio demandu la interesiĝantoj.

Recenzejo

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Th. Kieseritzky k Fr. Lindén : Esperanto-Lehrgang I. Eldonejo Rapida Venko, Uppsala. 144 pĝ. Form. 12 × 18. Prezo : 1 mk. g.

K-do Linden jam distingis sin kiel aŭtoro de bona lernolibro por svedoj. Kaj nun aperis laŭ la sama praktika metodo verkita lernolibro por german-lingvanoj. Li celas prezenti la lernmaterialon *facile* k *interese*, tamen sen domaĝi la klaron de l'gramatika klarigado. Aliflanke tro granda amplekso ne devas timigi la lernanton. Ni konstatas, ke tiu celo estas atingita k ankaŭ, ke la prezo por la libro estas modera. Ni notas, ke estas utiligita ĉapitro el « Petro ». Aranĝo k ekstera aspekto estas bonaj.

Radio-programo

25.7. : 21. 30-21. 50 h. Minsk, 1105 m (Snejko), blankrusa poezio (*samhore* : 27. 7., 31. 7., 1., 3., 5., 7., 9. 8.).

26. 7. : 22.35-22.55 h Warszawa, 1400, Krakov, 312,8 m, parolado.

4. 8. : 22.15 h Brno k ĉiuj ĉeĥoslov. sendstacioj pri politika temo.

NIA POŜTO

15 324. — Mono por F. ricevita. Ni eksendis.

Ekster nia Movado

En la orient-azia grandurbo *Sanĥajo* fondiĝis nova esperanto-asocio, en kiu partoprenas diversnaciaj loĝantoj de tiu urbo. Membraro : 42, el kiu nombro 65 % vere parolas esp-on. La asocio jam aranĝis radio-kurson k preparas kurson laŭ rekta metodo. Ĉiusemajnaj kunvenoj en 313, Kiangsi Road (la sidejo). Leter-adreso : P.O. Box 1871, *Shanghai* (Ĉinio).

En aprilo la esp-istoj de Nederlanda Hindio fondis « Orienthinda Esp. Organizo », kies anaro konsistas el eŭropanoj, hindaj indiĝenoj k ĉinoj. La asocio eldonas gazeton k perleteran kurson.

Laŭ decido de la franca ministro de P.T.T. okazas ĉiusemajne esp.-lingvaj radio-paroladoj pri turismo en Francio (ĉiusabate de 15.15-15.30 h.) el la Eiffel-turo (Parizo).

La franca k hungara poŝtdirekcioj per oficialaj cirkuleroj rekomendis al siaj oficistoj partopreni en la internacia esp-kurso por poŝtistoj, kiu okazis en Arnhem (Holando) fine de junio. Ili konsentis por tiu celo doni libertempon al partoprenontoj.

Komence de junio okazis la 30-a Franca Kongreso de Esp-o en Orléans, kiun partoprenis 150 p. Laŭ la sekretaria raporto estas faritaj oficialaj kursoj en 1 supera lernejo, 8 liceoj aŭ kolegioj, 2 normalaj lernejoj, 11 unuagradaj superaj lernejoj, 3 urbaj kursoj k 3 elementaj lernejoj de Francio.

La 4-an Flandran Esp. Kongreson en Meĥelen (komence de junio) ĉeestis 214 p. La urbestro akceptis la kongresanojn. — Samdate kunvenis Svisaj esp-istoj en Neuchâtel. 15 lokaj grupoj de la Svisa Esp. Asocio estis reprezentitaj. — Okaze de la 6-a Pola esp. kongreso en Varsovio (4/5. junio) okazis memorsoleno sur la tombo de d-ro Zamenhof k malkovro de honortabulo al la unua esp. poeto A. Grabovski.

Helpu Varbi !

Sendu materialon por nia ekspozicio el la tipografista sindikato. *Aladaro Breŭer*, Dunajska 55, *Bratislava* (Ĉeĥoslovakio).

Grupo Zamenhofa, Amsterdamo petas koresp. de Gek-doj en ĉiuj landoj. Resp. garantiata. Skribu kiel eble plej baldaŭ k adresu : *Frans ten Hagen*, de Kempenaerstr. 58-1 *Amsterdamo*, Nederlando.